

Gazeto 
 *Andaluzia*

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

28-a Jarkolekto * Septembro 2012 * N-ro 97

ISSN 1576 - 0618



GUADIX

Donaco de la Geografio kaj la Historio

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto**.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto

REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)

DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.

IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ

REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ

(esperanto14@ono.com)

ENHAVO

17-a Andaluzia Kongreso de Esperanto Granado 2012	3
La Festoj de la Kortoj en Kordovo	12
Lingva Angulo	15
Poezio	18
Nova Esperant-lingva Libro en Andaluzio	19
Turismi en Guadix (Granado)	21
Paĝoj pri nia historio	26
Flamenko	29
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio	31
Humuro.....	34

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.

17-a Andaluzia Kongreso de Esperanto

Granado, 15-a / 16-a decembro 2012

La okazigo de la 17-a Andaluzia Kongreso de Esperanto en la urbo Granado estis lastmomenta decido, do ne temis pri facila afero, ĉefe pro la fakto, ke la aferojn pri la organizado de la programeroj, la invitoj al la prelegantoj, la organizado de turisma vizito al la Alhambro kaj ĉefe, la trovo de la kongresejo, oni devis solvi el fora loko, ne ĉe Granado mem, ĉar tie loĝis neniu estrarano de nia Asocio. Malgraŭ tio, ni kalkulis kun la dankinda helpo de nia almeria juna samideano Inda Segura, nuntempe loĝanta en la urbo Granado.




Unuamamente, la Granada Urbodomo certigis al ni la pruntedonon de bela kongresejo meze de la urbo, tamen, lastminute, ili ne povis plenumi tiun unuan oferon, ĉar dum la pripensita semajnfino okazis tie la kunveno de alia asocio. Do, la atingo de taŭga kongresejo fariĝis urĝa afero. Feliĉe ni sukcesis, ĉe la urbocentra hotelo *Anacapri* la Asocio luis belegan kaj ege trankvilan salonon, kiu dum la tuta semajnfino estis je nia tuta dispono. Kompreneble la okazigo de

la Kongreso ĉe hotelo faciligis ankaŭ la aferon pri la restado de kelkaj gepartoprenantoj.

Tiel, la sabato 15-a de decembro frumatene, la organizantoj ornamis la grandan salonon pere de esperanto-afiŝoj, ankaŭ tie ni starigis giĉeton por la libro-servo. La Kongreso komenciĝis je la 10:30-a matene, ekde tiam alvenis la gepartoprenantoj el la urboj Malago, Kordovo, Sevilo, Granado, Jaeno kaj Onubo kaj aliaj speciale invititaj de Katalunio, Valadolido kaj Kantabrio. Entute, proksimume 45 homoj ĉeestis la 17-an Andaluzian Kongreson de Esperanto.

Je la 11-a horo la Prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, S Ángel Arquillos kaj la Sekretario José María Rodríguez malfermis la kongreson kaj bonvenis la ĉeestantojn. Ili parolis pri la nuntempa situacio de Esperanto en Andaluzio, sufiĉe kontentiga pro la sukcesa organizado de kursoj pri la internacia lingvo en Malago, Kordovo, Sevilo, Motrilo kaj Jerezo, ekde antaŭ multaj jaroj oni ne organizis tiom da kursoj en Andaluzio. Ankaŭ la eldona agado de la Asocio dum la jaro 2012 estis fruktodona, tiel, daŭre aperis niaj informiloj *Gazeto Andaluzia* kaj *Monate ĉe Vi*. Ankaŭ oni informis pri la ĵusa publikigo de libro en esperanto fare de nia Asocio: "*mediteraneaj eroj*", poemaro kies aŭtoro estas Ángel Arquillos.



Post la prezento de la libro, la aŭtoro mem legis kaj deklamis kelkajn el la poemoj. La libro enhavas mallongajn poemojn kaj hajkojn, en kiuj la aŭtoro priskribas viverojn. Post ĉi tiu eldono, Andaluzia Esperanto-Unuiĝo volas revivigi sian eldonan agadon, tiel, la Sekretario de la Asocio sciigis al la ĉeestantoj, ke AEU povus eldoni eĉ unu aŭ du

Kovrilo de *mediteraneaj eroj*, kies aŭtoro estas Ángel Arquillos.

librojn ĉiujare, espereble ankaŭ dum la jaro 2013 ni povos prezenti pliajn novajn eldonaĵojn.

Nia jaena samideano Pablo Foche estis la unua preleganto. Li parolis pri informadiko, konkrete pri Linukso. Verŝajne temas pri hazardo, sed multaj geesperantistoj uzas ĉi tiun liberan informadikan sistemon, anstataŭ Vindozo, ĉu la diferencoj inter ambaŭ sistemoj similas al la diferencoj inter la angla lingvo kaj esperanto? Pablo Foche prezentis sian prelegon kun la helpo de informadika prezento, kio ja faciligis la komprenon de ĉiuj aŭskultantoj.



Pablo Foche prelegas pri Linukso

La sekvanta programero estis prelego de Miguel Fernández pri la granada poeto Federico García Lorca. Ĉu iu ne konas Miguel Fernández? Li estas konata esperantisto, li naskiĝis en Granado, kvankam de antaŭ multaj jaroj li loĝas en Madrido. Li verkis originale en esperanto kaj ankaŭ tradukis verkojn de elstaraj hispanlingvaj verkistoj, ĉefe poetoj, inter ili Federico García Lorca kaj Miguel

Hernández. Miguel Fernández jam ĉeestis la Unuan Andaluzian Kongreson de Esperanto en Kordovo en la jaro 1983, li eĉ estis la proponanto de la nomo de nia asocio: *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*. Do, ni devis atendi preskaŭ 30 jarojn por vidi lin denove ĉe ni.

La prelego de Miguel Fernández estis ĝuinda juvelo, li sciigis nin ne nur pri sia kono pri la granada poeto sed ankaŭ sia emocio kiam li deklamis kelkajn poemojn de García Lorca, en la hispana kaj en esperanto, kaj li eĉ kantis tipajn popolajn kantaĵojn de la tiutempa Granado kiuj inspiris al García Lorca.



Miguel Fernández prelegis kaj deklamis pri Federico García Lorca

Alvenis tiam la tagmezo kaj ankaŭ la tempo por komune vesper-manĝi. Kvankam iom malfrue preskaŭ ni ĉiuj iris al apuda memserva restoracio, tie ni povis trankvile paroli, rakonti, ridi kaj kompreneble ankaŭ manĝi, trinki kaj kafumi. Dumvespere, denove ĉe la kongresejo, komenciĝis elementa kurso de esperanto. Dum ĉi tiu kongreso oni organizis rapidan elementan kurson, tio de ĉiam estis

projekto okaze de pasintaj andaluziaj kongresoj, sed verdire ni neniam sukcesis okazigi ĝin. Tamen, ĉi-jare ni ja sukcesis kaj dank'al la oferemo de nia onuba samideano Rafael Mateos, dek homoj eklernis la lingvon. Kelkaj el ili jam konis iomete la internacian lingvon, aliaj konis eĉ ne unu vorton, tamen ĉiuj profitis tiun unuan sesion, kaj la duan okazontan dimanĉe matene, por ekscii ion pri esperanto.



Gepartoprenantoj en la elementa kurso de esperanto dum la Kongreso.

La ceteraj gekongresanoj, do tiuj kiun ne ĉeestis la kurson profitis la vesperon por babili, rakonti okazintaĵojn pri sia esperanto-vivo kaj simile. José María Rodríguez parolis poste pri la historio de la Alhambro, ĉi tiel ĉiuj konis la historion de la monumento kiu estus vizitata de la kongresanaro dum la vespero de tiu sabato. Por ebligi tiun viziton la organizantoj de la Kongreso parolis antaŭ kelkaj monatoj kun la estraro de la fondaĵo reganta la monumenton. Tiel, ili invitis nin viziti la Alhambron, interkrampe oni devas diri, ke la Alhambro estas la monumento plej vizitata en Hispanio. La fondaĵo akceptis nian peton faciligi la alvenon de la gekongresanoj, ili eĉ ebligis nian transporton al la monumenton kiu troviĝas sur la pinto de monto apud Granada.

Je la 8-a horo vespere ni vojaĝis el Granado en la Alhambro pere de privata aŭtobuso. Okaze de la vizito ni ĝuis la ĉiĉeronadon de du specialaj gvidantoj, unu estis Jordi Lietor, nia jaena samideano estas profesia turism-gvidisto; la alia estis Miguel Fernández, kiu naskiĝis ĉe la apuda kvartalo Albajcino, kaj kiu laŭ siaj propra diro, li ludis dum infanaĝo ĉe la Alhambro mem.

La etoso en la Alhambro estis belega. La dumnokta pluveto, la mallumo kaj ĉeesto en la monumento nur, aŭ preskaŭ nure, de la esperantistaro, ebligis koni la palacojn kaj kortojn de la Alhambro, el kie regis la Granadan Regnon la islama nasria dinastio dum kelkaj jarcentoj. Je la 10-a vespere, denove per-buse la gepartoprenantoj revenis en Granadon. Finiĝis tiam la unua tago de la Kongreso.



Kelkaj gepartoprenantoj en la Kongreso okaze de la komuna vesper-maĝo

Dimanĉe matene, la 16-an de decembro, la unua programero temis pri turisma vizito al la granada kvartalo Albajcino. Tiuj kiuj ne partoprenis en tiu vizito restis en la kongresejo, kie Rafael Mateos okazigis la duan sesion de la rapida kurso de esperanto. Kiel dirite, la ceteraj gepartoprenantoj profitis tiun matenon por viziti la tipan Albajcinon, sendube temas pri la plej bela kvartalo en Granado. Dum du horoj ni promenadis tra mallarĝaj kaj belegaj placoj kaj stratoj, ni trapasis antikvajn pordegojn kaj ni ĝuis la belegan pejzaĝon el kie ni povis vidi la Alhambron kaj fone la Neĝan Montaron.



Grupeto da kongresanoj ĉe la kvartalo Albajcino en Granado

Intertempe, okazis la dua sesio de la elementa kurso de la internacia lingvo, kies profesoro estis Rafaelo Mateos. Ĝuste je la 12-a horo, tiu sesio finiĝis kaj la gekongresanoj kiuj promenadis tra la Albajcina kvartalo revenis en la kongresejon. Je la 12:30 José María Rodríguez parolis iomete pri Flamenko, ĉi tiu kultura esprimado, kiu de antaŭ kelkaj jaroj estas Ne-Materia Havaĵo de la Homaro, laŭ deklaro

de Unesko. Li parolis pri la origino de la Flamenko, kiam kunfandiĝis la al-andalusaj moriskoj kaj la persekutataj ciganoj en Andaluzio kaj ankaŭ pri kiamaniere oni esprimas la flamenkan arton, pere de la kantado, la dancado kaj la gitar-ludado.

La mallonga prelego pri Flamenko finiĝis per agrabla surprizo de la organizantoj de la Kongreso. Oni invitis al Iván Centenillo, granada flamenka kantisto, ludi flamenkajn kantaĵojn ene de la kongresejo mem. Tiel, Iván alvenis kune kun la gitar-ludisto Kiki Corpas kaj Curro Andrés, kiu akompanis lin manplaŭdado. Dum duonhoro ili ludis kelkajn tipajn flamenkajn kantaĵojn, tiel: *segurías*, *alegrías de Cádiz*, *fandangos*, ktp. Kaj fine okazis belega surprizo, Iván preparis kaj ludis flamenkan version de la esperanto-himno, feliĉe tiun momenton ankoraŭ oni povas vidi ĉe la jutuba kanalo ĉe:

<http://www.youtube.com/watch?v=erz5P-HYw1g>



Ivan Centenillo (kantas), Kiki Corpas (gitar-ludas) kaj Curro Andrés (manaŭpludas) ludas flamenkan version de la esperanta himno okaze de la Andaluzia Kongreso de Esperanto en Granada

Proksimume je la 2-a horo la Kongreso finiĝis. La rezulto estis ege kontentiga, ĉeestis kvardeko da gesamideanoj de la tuta Andaluzio kaj de aliaj provincoj, oni organizis sukcesan kulturen programon, la dumnokta vizito al la Alhambro estis belega kaj la prelegoj altnivelaj, oni devas elstari la ĉeeston de la granada esperantisto Miguel Fernández, kiu oferis al ni ne-forgeseblan prelegon pri Federico García Lorca. La Kongreso ankaŭ estis grava por la naskiĝanta movado en Granado, ĉeestis la renkontiĝon preskaŭ deko da granadaj interesitoj pri esperanto, inter ili kelkaj parolantaj bonege la internacian lingvon, do, espereble baldaŭ ekzistos organizata movado en tiu belega urbo kaj provinco. La Kongreso ankaŭ estis fruktodona por la andaluzia asocio, ni kapablis organizi sukcesan renkontiĝon kiu altiris la atenton de gesamideanoj de la tuta Andaluzio, krome la sola lingvo uzata dum la kunveno estis la internacia kaj la disvendado de libroj estis ankaŭ tre fruktodona.

Espereble, ĉi tiu sukcesa Kongreso denove ripetiĝos okaze de pliaj esperantistaj kongresoj en Andaluzio ĉar videble esperanto bonfartas en nia lando kaj ĉi tiu Kongreso en Granado estis bona pruvo pri tio. Fine, Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, kiel asocio organizanta la 17-an Andaluzian Kongreson de Esperanto, deziras danki al tiuj kiuj ebligis kaj kunhelpis la disvolvigon de la renkontiĝo.



LA FESTO DE LA KORTOJ EN KORDOVO

En Parizo, fine de la pasinta jaro, UNESKO enirigis la Feston de la Kordovaj Kortoj ene de la listo de Ne-Materiaj Havaĵoj de la Homaro. Ĉi tiu festo estas organizata en ĉi tiu andaluzia urbo ekde la jaro 1933, ĝia celo estas malfermi ĉi tiujn tipajn konstruaĵojn al la ĝenerala publiko. Pro la varmega kaj seka klimato de la urbo Kordovo, ekde la romia epoko la kordovanoj loĝis ĉe tipaj konstruaĵoj ĉirkaŭ centra puto. La araboj renovigis ĉi tiun arkitekturan skemon, tiel ili malfermis la enirejon al apudaj stratoj pere de vestiblo (*istawán*) kaj ili uzis planktojn por pligrandigi la freŝan etoson ĉe la varmega urbo.



Kordova korto de modema arkitekturo

Ĉe ĉi tiuj tipaj domoj, starigitaj ĉirkaŭ centra korto kun puto, kaj kun komuna kuirejo kaj necesejoj loĝis kelkaj familioj, ĉiu familio uzis ĉambron kiel salonon kaj manĝejon kaj aliajn ĉambrojn kiel dormejojn. Ĝenerale la konstruaĵoj estis du-etaĝaj, kvankam ekzistas aliaj kortoj pli grandaj eĉ kun propraj internaj stratoj.

La spirito pri komuna vivo ene de ĉi tiuj konstruaĵoj jam ne plu ekzistas, ekde antaŭ multaj jaroj ĉe tiuj domoj loĝas unusola familio, tamen la beleco de la korto ornamita de centoj da floroj, la centra puto kaj la antikva ilaro, ofte tre bone konservita, instigis al la Kordova Urbodomo organizi jaran konkurson kaj premii tiun korton pli bone ornamita de la enloĝantoj, naskiĝis tiam la festo de la Kordovaj Kortoj.



Tradicia Kordova Korto

La festo okazas ĉiujare meze de la monato majo, speciala monato en la urbo Kordovo pro la fakto, ke preskaŭ ĉiuj tagoj dum ĝi okazas speciala festo, ĉu la festo de la floraj krucoj komence de la monato, la festo de la kortoj, la festo de la kordova vino kaj fine de la monato la tipa kordova foiro.

La festo de la kordovaj kortoj havas du branĉojn, unu pensita por tiuj antikvaj kaj tradiciaj kortoj kaj la alia por tiuj modernaj konstruaĵoj kiuj sekvis en sia arkitekturo la skemon de la tradiciaj kortoj, tio estas: centra korto en la domo kaj la ĉambroj ĉirkaŭanta ĝin. La premio por ambaŭ branĉoj estas kvanto da mono por la posedantoj

de la domo, kiu ĝenerale uzas ĝin por pagi la koston de la ĉiujara prizorgado de la domo.



Dum la pasinta jaro 2012 preskaŭ dudeko da kortoj prezentigis al la konkurso, kiuj denove dum la kuranta 2013 profitos la monaton majon por ornamu la korton kaj la faŝadon pere de belegaj floroj kaj ĉi ĉio en belega urbo: Kordovo.

Krom la kortojn, ankaŭ oni ornamas en Kordovo dum la monato majojn kradojn, fenestrojn kaj balkonojn



Lingva Angulo

Fari – Fariĝi – Igi - Iĝi

Sciante, ke la verbo **FARI** signifas “estigi el io”, ĝi estas transitiva verbo, do, ekzistas subjekto “tiu kiu estigas aŭ faras” kaj objekto, “tio kion la subjekto estigas aŭ faras”. Ni vidu kelkajn simplajn ekzemplojn:

- *La lignajisto faras meblon*
(El carpintero hace un mueble).
- *La panisto faras panon ĉiumatene.*
(El panadero hace pan cada mañana).

Kompreneble, ekzistas diversaj sinonimoj de la verbo FARI, tiel oni povas uzi ankaŭ verbojn kiel: *konstrui, fabriki, ellabori, krei, produkti...* ĉiuj ili, kaj kelkaj aliaj, posedas la saman signifon: FARI.

Kiel dirite, se ni uzas la aktivan formon de la verbo FARI, do, ne la pasiva, estas necese aldoni aŭ sciigi pri la objekto farita, eĉ se oni uzas la i-formon de la verbo:

- *Mi ne scias fari panon, pro tio mi aĉetas ĝin ĉiumatene.*
(Yo no sé hacer pan, por eso lo compro cada mañana.)
- *El tiu mineralo estas eble fari belegajn juvelojn.*
(De ese mineral es posible hacer unas joyas bellísimas.)
- *El tiuj vortoj oni povas fari aliajn vortojn.*
(De esas palabras se pueden hacer otras palabras.)

La pasiva formo de la verbo FARI estas:

- *La libro estas farita el altkvalita papero.*
(El libro está hecho de un papel de gran calidad.)
- *La monumento estas farita de lokaj masonistoj.*
(El monumento ha sido hecho por albañiles locales.)

Krom ĉi tiu FARI esprimanta “*estigi ion*”, ankaŭ estas eble trovi alian FARI signifanta “*plenumi agon*”. La ago mem aperas kiel objekto aŭ eĉ la objekto povas esti komprenata se ĝi ne aperas konkrete sur la frazo.

- *Mi ne faros eraron en la ekzameno, se vi antaŭe informas al mi pri la taŭga respondo.*
(Yo no haré ningún error (*no cometeré*) en el examen, si tu antes me informas de la respuesta adecuada.)
- *Du laboristoj kapablas fari pli multe ol unu.*
(Dos trabajadores son capaces de hacer mucho más que uno.)
- *Mi vojaĝos al Parizo, kiel mia frato ankaŭ faris.*
(Yo haré un viaje a París, como mi hermano también hizo.)

La verbo FARIĜI montras “*ŝanĝon de stato sen ekstera kaŭzanto*”, do, la subjekto estas tio, kio ŝanĝiĝas, aperanta neniu objekto. Tiel, ne temas pri transitiva verbo.

Ni vidu kelkajn ekzemplojn:

- *Mia frato studis juron en la Universitato kaj post kelkaj jaroj li fariĝis advokato.*
(Mi hermano estudió Derecho en la Universidad y después de algunos años se hizo (*se convirtió en*) abogado.)
- *Ŝi fariĝis tiel malagrabla, ke ŝia fianĉo ĉesis ami ŝin.*
(Se hizo (*se volvió*) tan desagradable, que su novio la dejó de amar).

FARIĜI ankaŭ estas uzata en frazoj kie la subjekto mem estas la rezulto de la ŝanĝo, tiam la signifo povas esti pli-malpli “*okazi*”.

- *Fariĝis somero* (Se hizo el verano).

- *Dum la vespero fariĝis granda ŝtormo.*
(Durante la tarde se hizo (*ocurrió*) una gran tormenta.)

“Fariĝi” estas tradicia vorto, lastatempe estas pli aktuala la verbo **IĜI**:

- *Mia fratino iĝis kuracistino* (Mi hermana se hizo médica).
- *Ŝi iĝis kolera* (Ella se encolerizó)

Ĉi-kaze estas pli tradicie diri “*Ŝi koleriĝis*”.

Do, oni povas uzi libere *fariĝi* aŭ simple *iĝi*. Sed atentu, la formo **IĜI** ne povas signifi “okazi”, kiel en la antaŭaj ekzemploj. Tio signifas, ke ni povas diri:

- *Fariĝis la nokto* (Se hizo la noche).

Sed neniam: *Iĝis la nokto*.

Kompreneble, oni povas diri: *Noktiĝis*.

Se *iĝi* = *fariĝi*, ĉu *igi* egalas al *fari*?

IGI devenas el la sufikso –IG- ĝia signifo estas “*kaŭzi, ke iu faru iun agon*”. La subjekto de la vergo IGI estas tiu, kiu kaŭzas ke iu alia faru ian agon. Jen klarigaj ekzemploj:

- *Ni devas igi lin, koni novajn geamikojn.*
(Nosotros debemos hacerle conocer nuevos amigos).
- *La proksimaj ekzamenoj igis lin, pli intense studi.*
(Los próximos exámenes le hicieron estudiar de manera más intensa).
- *Mia rideto igis lin pensi, ke mi mokis pri li.*
(Mi sonrisa le hizo pensar que yo me mofaba de él).

Do, la verbo IGI, se tiel, neniam signifus produkti, krei, ellabori, fabriki, tio estas: fari. Oni ne devas diri: *la lignaĵisto igis meblon* aŭ *Dio igis la mondon*. Por ĉi tiuj frazoj ni devas uzi la verbon fari aŭ similaĵoj (krei, produkti, fabriki...).



POEZIO

Mi vin serĉis je l'auroroj kaj je ĉiu subsuniro,
kaj etendis al vi mian manon kun la humiligo
de la almozul' petanta mondonacon per suspiroj,
sed pri vi mi amsoifas kaj pretendas la atingon
trovi vin ĉe la altaĵo de plej glora mondopinto.
Gloraltaĵoj ne sufiĉas por enhavi vian virton,
kreskas en mi tamen amon al vi preter mia vivo.
Ĉu mi ĉe la kor' ne gardos vian nomon kaj prestiĝon
ĝis la horo, kiam venkos via amo super ĉio ?
Jen pro tio, ke mi laŭdos vian nomon ĝis vivlimo,
Dum en mia elspiro restos el l'amata viva Dio !

Ŝelomo ben Jehudah ibn Gabirol
Malago 1021 – Valencio 1058

Esperantigis Antonio Marco Botella

NOVA ESPERANT-LINGVA LIBRO EN ANDALUZIO

Fine de la jaro 2012 Andaluzia Esperanto-Unuiĝo rekomencis sian eldonan agadon, ĉi-foje pere de la eldono de poezia verkaĵo “*mediteraneaj eroj*”, kies aŭtoro estas Ángel Arquillos.


Verŝajne, ĉiuj vi konas Angel, li estas esperantisto de Linares (Jaeno), loĝanta de antaŭ multaj jaroj en Malago, li esperantiĝis en Madrido dum la 7-a jardeko de la pasinta jarcento. Li estas aktiva esperantisto, li estas la prezidanto de A.E.U., tamen lia

verkema agado ne estis dise konata. Malgraŭ tio, li estas aktiva verkisto ĉe interreto, kie li diskonigis siajn poemojn.

La antaŭparolon verkis nia kordova samideano José María Rodríguez, ankaŭ indas diri, ke la tuta verkaĵo estas plena je desegnaĵoj kiuj sendube allogas la enhavon, ĉar ĉiuj ili rilatas al la poemoj. Ángel verkis mallongajn poemojn, ankaŭ aperas kelkaj hajkoj ene de la libro. La celo de ĉiu poemo estas priskribi momenton kaj senton, momento kiu tutcerte ne ripetiĝos, do indas aperi ĝin sur folion.

Plejeble tiu estas la klarigo de la titolo *mediteraneaj eroj*, ĉar temas pri pecoj, eroj, ne pri kompleta rakonto pri iu temo, sed multaj pecoj pri malsimilaj momentoj.

La libron oni prezentis kadre de la Andaluzia Kongreso de Esperanto en Granado dum la monato decembro 2012. Tiam Ángel



Arquillos diris, ke li verkas en esperanto kaj en la hispana lingvoj, kaj ĉi-foje temis pri la eldono de parto de siaj esperantlingvaj poemoj kvankam poste alvenos alia hispanlingva libro.

La libro estas ege rekomendinda, kaj ne nur pro la fakto, ke verkis ĝin bona amiko, sed ankaŭ, ĉar la verkado de mallongaj linioj priskribantaj konkretajn momentojn kaj sentojn, kuraĝigus la leganton fari same, tio estas, surpaperigi tion kion oni sentas okaze de ĝusta momento.

“*mediteraneaj eroj*”, de Ángel Arquillos López.

Eldonanto: Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Kordovo, 2012

ISBN 9788493030445 Formato: 63 paĝoj, 21 cm.

Prezo: 6 €

- Aĉetebla ĉe libro-servo de Universala Esperanto-Asocio
reta mendilo: <http://katalogo.uea.org?inf=1650>
- Aŭ ĉe la libro-servo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
esperanto14@ono.com

*Mi bezonas nur minuton
por verki etan poemon,
kiu temas pri malamo
aŭ temas pri amo-sento*

*Se pri amo-sento temas,
mi tre ĝuos ĉi-momenton,
sed aferoj pri malamo,
mi forĵetos al la vento.*

*Mi bezonis nur minuton
ĉar minuto estas tempo,
por pripensi mil diraĵojn
kaj vigligi la solecon.*

de la libro “meditareneaj eroj”-

Turismi en ... GUADIX (Granado)

La granada urbo Guadix (esperantlingve *Guadikso*) estas unu el la plej antikvaj loĝataj lokoj en la Ibera Duoninsulo. Post la batalo de Munda (45 a.K.), la romia imperiestro Oktavio Aŭgusto decidis fondi urbon, apud jam ekzistanta ibera vilaĝo, kie loĝus la eksoldatoj de la 1-a kaj 2-a legioj, venkantaj en tiu batalo kontraŭ la kartaganoj. Naskiĝis tiam la kolonio *Julia Gemella Acci*. La urbo prosperis kaj post kelke da tempo oni rajtigis ĝin eĉ stampi proprajn monerojn. Laŭdire, Guadikso estis la unua urbo kristanigita en la Ibera Duoninsulo, pro tio ekde ĉiam ekzistis la episkopejo Guadix-Baza, kvankam la urbo ne estas provinca ĉefurbo.

Kiam la islamanoj eniris en la Iberan Duoninsulon, komence de la 8-a jarcento, ili adaptis la nomon de la romia kolonio en la araban lingvon, tiel la romia *Acci*, fariĝis *Wadi Ash*, tio estas: *rivero Ash*, aŭ laŭ la popola prononco de la tiamaj enloĝantoj *Wuadish*, de tie devenas la nuntempa nomo *Guadix*.

La arabaj enloĝantoj de la urbo neniam favoris al la kordova emiro, do okazis ofte ribeloj kontraŭ la kordova kalifejo. Tiel en la jaro 1145 Ahmad Ibn Malham proklamis la regnon de Guadikso kaj Baza, kunligita al la Almohada Imperio. Post la defalo de ĉi tiu nordafrika islama imperio la urbo apartenis al la islama regno de Granado.



Blazono de Guadikso

En la jaro 1362 luktis en Guadikso la armeo de Kastilio kontraŭ tiu de Granado, kiuj venkis al la kristanaj trupoj, tio malrapidigis la konkeron de Granado fare de la kristanaj regnoj. Sed definitive, en la jaro 1489, tio estas tri jaroj antaŭ la malapero de la islama regno de Granado, la kristanoj eniris en Guadikson.

Post la kastilia konkero de la urbo, ĝi fariĝis tre grava episkopa sidejo. Tamen, la ribelo de la moriskoj en la Alpuharo kontraŭ la reĝo Filipo la 2-a favoris la forigon de granda nombro da moriskaj enloĝantoj, kun ili malaperis gravaj tradiciaj okupoj kiel la silk-produktado. Multaj ribelantoj, jam venkitaj, revenis en la eksteran parton de la urbo kaj kaŝite, ili kavigis la argilajn montarojn ĉirkaŭantaj la urbon, naskiĝis tiam la famaj grotoj de Guadikso, kie ankoraŭ hodiaŭ loĝas granda nombro da homoj.

La kastiliaj reĝoj privilegiis la urbon. Oni starigis belegan katedralon kaj la jezuitoj konstruis gravan lernejon. Sed kun la napoleona invado de Hispanio, komence de la 19-a jarcento, la urbo dekandecis, la militoj, epidemioj kaj la malapero de industrioj malriĉigis la enloĝantaron, kiu ekde tiam laboris en la kamparo sur teruraj labor-kondiĉoj.

Hodiaŭ Guadikso havas preskaŭ 20.000 enloĝantojn kiuj ĉefe laboras en la ter-kultura industrio. La urbo fariĝis grava komunik-centro, ĉefe pro la konstruo de aŭtovojo kiu ĝuste tie, disiĝas en du gravaj vojoj al Almerio kaj Murcio. Ekzistas projekto konstrui rapidan fervoj-linion, kio sendube estos grava ekonomia faktoro por la urbo.

Monumentoj

La Katedralo.-

Kiel dirite, kaj malgraŭ la fakto, ke Guadikso ne estas provinca ĉefurbo, ĝi ja estas episkopa sidejo. Kiel monumento elstariĝas do, la katedralo mem. Oni starigis ĝin sur la antikva islama moskeo. Oni ekigis la konstruon en la 16-a jarcento kaj ĝi finiĝis jam en la 18-a.

Tiel, la arkitekturaj stiloj estas tute malsimilaj, videblas elementoj gotikaj, renesancaj kaj barokaj.



La Alkazabo.-

La Alkazabo estas la araba kastelo de la urbo. Oni konstruis ĝin dum la 11-a jarcento. Post la kastilia konkero de Guadikso oni forlasis la fortreson kaj ĝi ruiniĝis. Dum la pasinta jarcento oni rekonstruis ĝin kaj nuntempe ĝi estas bela kaj vizitinda monumento. Elstariĝas la kvadrata ĉefturo.

La grotoj.-

Kiel dirite, la perskutitaj moriskoj faris el la montaro ĉirkaŭanta Guadikson sian rifuĝejon. Estis facile trabori la argilan terenon kaj tiel, tiuj homoj ekloĝis ene de artefaritaj grotoj. La ruĝa koloro de la montaro, la blanka kalko de la ekstera parto de la grotoj kaj fone la neĝitaj pintoj de *Sierra Nevada*, donas nekredeblan belecon al tiu preskaŭ dezerta pejzaĝo, sed apude plena je frukt-arboj.

Loĝi ene de montaro povas ŝajni io ne-komforta, tamen tute kontraŭe, tie la temperaturo estas konstanta, krome la silento kaj kvieteco de la interna parto de la monto estas agrabla sento por tiuj kiuj loĝas tie, nuntempe kelkaj el tiuj grotoj eĉ utilas kiel hoteletoj.



Grottoj en Guadikso

Festoj

Inter la 6-a kaj la 9-a de septembro okazas la plej konata festo en Guadikso, temas pri la festo de *Cascamorras*. Ĝi estas festo kunorganizata kun la apuda vilaĝo Baza. Ĉi tiu festo havas historian originon, en la jaro 1490 oni decidis starigi preĝejeton en Baza, kiam la masonistoj eklaboris en la konstruado unu el ili trovis statuon de la Virgulino Maria, kaŝita antaŭ la alveno de la islamanoj en la 8-a jarcento. Kompreneble tiun trovon oni konsideris miraklan aferon.

La masonisto kiu trovis la statuon naskiĝis kaj loĝis en Guadikso, tamen la aŭtoritatoj de Baza konsideris, ke la statuto devis aparteni al ĉi tiu vilaĝo, ĉar trovita tie. Do, oni ekigis juran proceduron kiu finiĝis per la decido, ke la ĵus trovita statuo de la Virgulino Maria apartenus al la vilaĝo Baza kaj oni aprobis la okazigon de speciala festo por honori ŝin.

Guadikso rifuzis tiun decidon, do oni kreis tie kunfratigon kies celo estis rabi la statuon al Baza kaj alvenigi ĝin en Guadikson. Do, ĉiujare oni organizas specialan feston, kies celo estas sendi guadiksanan junulon, nomita *cascamorras*, vestita en buntaj koloroj kun la celo rabi la statuon. Siafoje, la enloĝantoj de Baza rifuzas lin kaj malpurigas lin pere de nigra inko. Kiam la *cascamorras* revenas en Guadikson li

denove estas malpurigita per nigra inko, ĉar li ne sukcesis preni la statuon de la Virgulino.



Festo de *Cascamorras*. Ne nur li estas malpurigita per nigra inko.

Gastronomio

Post la moriska ribelo de la 16-a jarcento oni alvenigis en Guadikson novajn kastiliajn enloĝantonj, do, oni forgesis la islamajn tradiciojn rilate la manĝaĵojn. Pro tio, estas tre grava en Guadikso la gastronomio bazita sur porkaĵoj. Elstariĝas la kolbasoj, tradicie ellaboritaj en ĉiu hejmo. Ankaŭ oni ellaboras bonan vinon.

Bongusta estas la *zalamandroña* (moruo kun legomoj) kaj la *rin ran* (stufaĵo de tinuso, terpomoj kaj kapsikoj).

Venont-numere Turismi en

Sanlúcar de Barrameda (Kadizo)

Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

D-ro Eduardo ARROYO SEVILLA
La lasta jaena humanisto

La historio de esperanto en Andaluzio estas plena de altnivelaj homoj kiuj interesiĝis, parolis kaj korespondis pere de la internacia lingvo esperanto, sed ĉefe elstariĝis en aliaj sciencaj fakoj, kiel la medicino, la arkitekturo, la juro, ktp. Unu el tiuj homoj estis la jaena D-ro EDUARDO ARROYO SEVILLA, unu el la plej famaj kuracistoj en Jaeno kaj kompreneble ankaŭ esperantisto.



Eduardo Arroyo naskiĝis en la jaena vilaĝo Torredelcampo en la jaro 1885. Li estis filo de la tiuloka kuracisto, pro tio ankaŭ li studis medicinon en la Universitato de Granado. Li eklaboris kiel kuracisto en sia propra vilaĝo sed jam en la jaro 1915 li marŝis en Jaenon kie li estus unu el la plej prestiĝaj kuracistoj.

Rilate la medicinon, li estis unu el la pioniroj de la kardiologio en Andaluzio. Li starigis propran laboratorion en Jaeno ekipita per modernaj iloj, li eĉ inventis unu el tiuj aparatoj: la *leŭkografo*, por kalkuli la nombro da leŭkocitoj. Li ankaŭ verkis multnombrajn artikolojn en sciencaj revuoj, kaj dank'al li oni sciis pri nova malsano kaŭzita de intesta parazito de li eltrovita.

Sed ne nur pri medicino li fakis. Li ankaŭ estis pioniro de la fotografio en Jaeno kaj Torredelcampo. Hodiaŭ centoj da fotografafaĵoj de li faritaj estas la bazo de la historia fotografia arĥivo de Jaeno kaj li

ankaŭ inventis aparaton uzebla por fotografii, temas pri la *verascopo*, pere de kiu estis eble vidi la fotojn tridimensie. Li ankaŭ interesiĝis pri radio kaj pri tio li alportis ideojn kaj novajn teknikojn tre utilaj por la disvastigo de la radio elsendado. Li eĉ studis pri tiutempa nova invento: la televido.

La D-ro Eduardo Arroyo Sevilla lernis esperanton. Dank'al la internacia lingvo li kontaktis kun homoj en la tuta mondo, do, ĉiuj esperantistoj vizitantaj Jaenon estis akceptataj en lia vilao, nomita *Buenos Aires*. Alfonso Escamilla Roa, alia grava jaena esperantisto kaj kiu konis la D-ron Arroyo, sciigis en sia biografio, ke komence de la 3-a jardeko de la pasinta jarcento venis en Jaenon du junaj germanoj parolantaj esperanton. Pro la fakto, ke li estis eksterlandanoj kaj Jaeno estis malgranda urbo, baldaŭ ambaŭ germanoj altiris la atenton de la jaena enloĝantaro. Ili renkontis kun Alfonso Escamilla kiu organizis viziton al la domo de la D-ro Arroyo, tie la kuracisto akceptis bonvene la vizitantojn kaj li organizis por ili turisman viziton al la urbo dum la sekvantaj tagoj. Tiel, la katedralon, la kastelon de Sankta Katerino kaj la judan kvartalon montris en esperanto la fama kuracisto al la du junaj germanoj, kiuj verdire ne vojaĝis okaze de turisma rondiro, sed male, ili fuĝis el Germanio pro la komecanta nazia teroro.



D-ro Eduardo Arroyo Sevilla kaj lia granda familio en Jaeno.

D-ro Eduardo Arroyo estis unu el la plej gravaj kuracistoj en Jaeno, tamen li ankaŭ dediĉis al aliaj sciencoj: fotografio, radio, televido; li ankaŭ eltrovis arkeologiajn restaĵojn en sia vilaĝo kaj li eĉ inventis aparaton kiu helpis koni la mineralojn trovitaj en la kamparo, do, unuvorte li estis aŭtentika humanisto. Li amikiĝis kun aliaj tiutempaj hispanaj intelektuloj, tiel D-ro Gregorio Maraŝón kaj la gitarludisto Andrés Segovia, ankaŭ jaenano, vizitis lin ofte en lia vilao *Buenos Aires*, kiu estis konsiderata de la jaenanoj kiel kultur-centro. La uzo de la internacia lingvo esperanto, okaze de vizitoj kaj de konstanta korespondado, ankaŭ estis io ofta en la vivo de ĉi tiu elstara jaenano.

Li forpasis en la jaro 1962. Tuj poste, la urbodomoj de Jaeno kaj Torredelcampo, lia naskiĝ-vilaĝo, aprobis nomi stratojn kun la nomo de ĉi tiu homo kiu ankoraŭ nuntempe estas konsiderata kiel la plej grava humanisto en Jaeno dum la pasinta jarcento.



Historia Arĥivo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Apartado de Correos 611

14080 Córdoba ~ esperanto14@ono.com

FLAMENKO

La segidilo

Ne pri ĉiuj kantaĵoj aŭ dancadoj de la flamenka arto ekzistas uzata vorto en esperanto, tamen foje oni povas legi pri *fandangoj*, *soleoj* kaj *segidiloj*. Hodiaŭ ni parolos pri ĉi tiu kantaĵo: *la segidilo*, kiu en la hispanan lingvon oni tradukas per *seguriya* aŭ *siguriya*.

La segidilo aperas dum la 18-a jarcento, oni diras ke la origino de ĉi tiu kantaĵo estas Jerezo aŭ la sevila kvartalo Triano. Temas pri tragika, forta kaj obskura kantaĵo, kiun la flamenka kantisto rolas malrapide, paŭzeme. Ĝi estas unu el la plej gravaj kaj belaj flamenkaj kantaĵoj kaj ĝi ofte parolas pri suferoj, am-doloroj kaj eĉ pri la morto mem. Do, ne temas pri plenĝoja kantaĵo.

En la unuaj momentoj de la flamenka historio la segidilon oni kantis sole, tio estas sen gitaro aŭ aliaj muzikiloj, sed nuntempe la gitaro ĉiam akompanas la kantiston dum la segidiloj kaj eĉ meze de la pasinta jarcento kelkaj dancistoj, kiel Vicente Escudero, dancis per segidiloj. Kompreneble temas pri dancado malrapida, sen ornamoj, kun korpaj movoj montrantaj tragikan okazintaĵon.



Tomás Pavón (1893-1952) kaj Pastora María Pavón Cruz *La Niña de los Peines* (1890-1969)

Rilate la metrikon de la segidiloj, la teksto enhavas kvar versojn: la unua, dua kaj kvara kun ses silaboj kaj la tria kun dek unu. Rimas la dua kaj la kvara versoj. Tiu estas la plej ofta metriko kaj rimado, tamen lastatempe ankaŭ eblas trovi segidilojn kun jenaj silaboj: 7-7-11-7 aŭ 8-5-11-6.

Grandaj segidil-kantistoj estis *El Planeta*, *Frasco el Colorao*, *La Niña de los Peines*, *Manuel Molina* kaj *Tomás Pavón*.

Jen la teksto de kelkaj segidiloj:

Se mi certe sciuz,
ke vi min ne amas,
malbenus mi Dion kaj tuj forirus
al maŭra landar'.

Kiam mi agonios
kovru mian vizaĝon.
Se min vidas l'morto, plejeble ĝi ne volos
preni mian animon.

Ĝuste sur ĉi loko
lasu min plori,
mortis mia patrino amata,
mi ne plu vidos ŝin.

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La tombejo de Boabdilo, la lasta granada reĝo.

Abu Abdalla Muhammad la 12-a, pli konata kiel Boabdilo aŭ “la juna reĝo”, estis la lasta sultano de Granada, ekde la jaro 1482 ĝis 1492. Li estis la lasta membro de la Nasrida dinastio, kiu regis la regnon de Granada ekde 1238 ĝis 1492.

Ĝia malvenko metis la finan punkton al la islamaj regnoj en Iberio. Li devis lukti ne nur kontraŭ la katolikaj gereĝoj sed ankaŭ okaze de enlandaj militoj, ĉefe kontraŭ sia onklo mem.



Boabdilo, la juna, laŭ
kastilia pentristo.

Ĉi ĉiuj luktoj faciligis la kristanan konkeron de Granada. La 2-an de januaro 1492 la reĝo Boabdilo kapitulacis antaŭ la Katolikaj Gereĝoj, kiuj rajtigis al Boabdil iri en la Alpuharon, ĉe la sudo de la granada regno kie loĝis majoritate muslimoj. Unuamomente, oni permesis al la venkitoj konservi ilian lingvon kaj religion, tamen post kelkaj jardekoj, oni devigis ilin fariĝi kristanoj, preni kristanajn nomojn kaj forgesi ilian lingvon. Boabdilo restis dum malmulte da tempo en Alpuharoj kaj jam en la jaro 1493, el la almeria vilaĝo Adro, li foriris en Feson, nuntempa Maroko, kie li loĝis fore de palacaj luktoj kaj ludante nenian gravan rolon en la tiea politiko. Li mortis en la jaro 1533.

Cent kvindenk jarojn post la morto de Boabdilo, la maroka historiisto Al Maqarri, kiu laŭdire konis la neparon de la lasta granada

reĝo, skribis, ke oni enterigis lin ĉe preĝejo tuj apud la Pordego de la Justico, aŭ *Bab Sharia*, en Feso, unu el la plej gravaj enirejoj de la antikva urbo, nuntempe tiu loko estas konata kiel la Pordego de la Bruligito.

Hispanaj spertuloj, inter kiuj troviĝas universitata profesoro pri jura medicino, vizitis la lokon kie ankoraŭ stariĝas malgranda preĝejo. Ene de ĝi ili trovis du korpojn, laŭ la unuaj studoj verŝajne unu el la korpoj apartenas al Boabdilo, kaj la alia al muslima sanktulo *Sidi Bel Kassen*, ofte oni enterigis politikajn gravulojn apud religiuloj.

La rekono de la korpo de Boabdilo estos malfacila tasko, ĉar la islamaj entombigoj de reĝoj, emiroj aŭ sultanoj realiĝis sen nenia apuda riĉaĵo, malsimile al tiuj de la tiutempaj kristanaj reĝoj, ĉiam entombigitaj kun blazonoj kaj la reĝa glavo.

La esploristoj asertis, ke nur eblos kompari la DN-acidon de la korpo de la patro kaj la avo de Boabdilo, entombigitaj en la kastelo de *Almuñecar* en la provinco Granado. Alia pruvo povas esti meksika viro, li sciigis, ke li estas ido de la filino de Boabdilo, Aixa, devige kristanigita kun la nomo Izabelo post la kastilia konkero de Granado kaj kiu elmigris poste al Ameriko.



Preĝejo en Feso (Maroko), kie, laŭ la esploristoj, troviĝas la tombejo de Boabdilo, la lasta granada reĝo.

¿Quieres ayudar al movimiento esperantista andaluz?

**!!! Hazte socio de la
Asociación Andaluza de Esperanto !!!**

Para asociarte contacta con: andaluciaesperanto@gmail.com

Cuota anual: 20 €

Que puedes hacer efectivos en una de las siguientes cuentas:

- Caja General de Ahorros de Granada
2031 0225 54 0100187657
- BBVA
0182 4106 71 0207160717

Cuando ingreses el dinero de la cuota por favor envíanos los siguientes datos:

- Nombre y apellidos.
- Concepto: Cuota 2013

Muchas gracias, necesitamos la ayuda y la colaboración de todos los hablantes de esperanto en Andalucía y también de todos aquellos que simpatizan con la lengua internacional.



HUMURO



Romeo kaj Julieta konatiĝis en babilejo, sed ilia am-rilato havis teruran finon, kiam la ret-servilo de Julieta definitive misfunkciis.



*La numero 100-a de nia revuo aperos dum la somero de la jaro 2013.
Ĉu Vi deziras kunlabori kun tiu numero?*

*Ni invitas al ĉiuj geesperantistoj kunlabori pere de artikolo, desegnaĵo,
rakonto aŭ kia ajn kunlaboraĵo.*

Se Vi estas preta kunlabori kun ni, bv. kontakti kun: esperanto14@ono.com

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Sekretario: José María Rodríguez Hernández
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonanto de Sevilo: José Roldán León
Voĉdonanto de Malago: Karmela San Segundo Cordero
Voĉdonanto de Onubo: Rafael Mateos González
Voĉdonanto de Arundo: Fátima Jiménez García
Voĉdonanto de Jaeno: Nomumota
Voĉdonanto de la Malaga Akserkio: Nomumota
Voĉdonanto de la Junularo: Juan Diego Díaz Bautista

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
esperanto14@ono.com

Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

TTT-paĝo: www.esperantoandalucia.com

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperan



Unu



Du



Tri



Kvar



Kvin



Ses



Sep



Ok



Nau



Dek